[noto] fonto: "budhana kuriero", n-ro 2521-1, 1978 (B.E. 2521)

# *Ĉu budhismo estas egoismo?*
# *- Kial ŝajne jes, kial vere ne? -*

**Franz Morawetz**, Danlando

Se mi intencas respondi tiujn interesajn kaj eble gravajn demandojn, necesas antaŭe scii, kion signifas la vorto “egoismo”. Kompreneble helpas nia Plena Vortaro kaj diras, ke la egoismo estas eksklusiva memamo, kiu igas nin serĉi en la vivo nian propran plezuron aŭ profiton.

El tiu klarigo ni devas certe forlasi, pri kiu aŭ kiuj homoj temas. La vorteto “ni” ne donas klarecon, ĉar la homoj ja estas diversaj. Unu amas sin mem, serĉas plezuron kaj profiton, kaj alia homo malpli aŭ eble tute ne. Kaj tiu diverseco jam bone donas ankaŭ la diferencon inter budhanoj kaj ne-budhanoj, oni povus diri.

Tio sed ne ĝustas ĉe plia observo. Budhanoj estas ankaŭ homoj, kiuj havas pli aŭ malpli tiun memamon; ili ankoraŭ ne tutforgesis ĝin, kvankam la celo aŭ la intenco de la Budha vojo, de la instruo de Budho estas forigi tiun memamon. Kaj la budhanoj klopodas en tiu direkto.

Aliflanke ekzistas ankaŭ aliaj homoj, ne-budhanoj, kiuj laŭ aliaj instigoj forlasis la memamon kaj estas sur la vojo pli malpli al la malegosimo.

Kaj la budhismo, pli klare la instruo de Budho, la kvar veroj, instigas al tio.

La unua vero nur konstatas, ke la vivo normala en la socio sur tiu ĉi tero ne estas agrabla, ne kontentiga, do mizera aŭ sufera, se ni ne volas resti ĉe la simplaj konstatoj de nekontentigeco.

La dua vero prezentas la kaŭzojn por tiu ĉi stato. La volo vivi, eĉ la soifo aŭ soifego por vivi estas laŭ ĝi la kaŭzo. Tiu soifego sekvas malamon kontraŭ aliaj, ĉar tiuj ja ankaŭ nepre volas vivi, ĝi sekvas havemon, ĉar ja necesas havaĵoj por daŭrigi la vivon, (oni pensas). Do defendi sin kontraŭ aliaj, kiuj ĝenas aŭ volas ion forpreni, tial pli bone batali kontraŭ tiuj malamikoj, la aliaj homoj, kaj nepre havi multe, por ĉiuj kaŭzoj, eĉ iom pli ol multe estas pli bone.

Kaj tiuj du ecoj sekvigas aŭ estas sekvo de la malĝusta opinio pri la mi. Unu sekvigas la alian, unu sekvas la alian. Unu kaŭzas la alian, unu estas la kaŭzo de la alia.

Oftege la homo pensas, kaj la hodiaŭa eduko ja ankaŭ estas en tiu direkto, ke li nepre devas zorgi, ke li estu bonranga persono, homo, kiu havas aŭ almenau ricevas ĉion, kion li ŝatas; riĉaĵo, havaĵo ja estas agrabla, li nepre havu bonan nomon, laŭeble altan

rangon kaj titolon, ĉar ja temas pri li. Li ĉiam zorgu pri sia stato, egale ĉu en familio, en lernejo, en laborejo, en societo, en partio, en korporacio aŭ sindikato, en la armeo, en sia ŝtato, en la socio. Kaj li nur pensu ĉefe pri si, pri "mi". La "mi" estas la plej grava por li, por lia sinteno kaj agado, por la malamikeco kontraŭ la aliaj kaj por la havemo.

La tria vero nun diras, ke necesas forigi tiun kaŭzon de la malagrableco de la vivo, tiun volon vivi, kiu baziĝas sur la malĝusta opinio pri la mi, sur la malamikeco kaj la havemo, se oni volas forigi la staton de nekontentigeco (vidu la veron unuan).

Se vi nun komparas la difinon de la Plena Vortaro kun tiuj ideoj de la Budha instruo, tiam estas la egoismo de la vortaro memamo, laŭ kiu oni ŝatas profiton kaj plezuron, laŭ budhismaj vortoj malĝusta opinio pri la mi, kiu kaŭzas la malamikecon kaj havemon, aŭ entute la volon vivi.

Kaj laŭ la instruo la budhano klopodu forigi tiun egoismon, tiun malĝustan opinion pri la mi, kun la malamikeco (aŭ malamo) kaj la havemo (aŭ avido, profitemo).

El tiu ni vidu, ke la budhismo, la instruo de Budho ne flegas la egoismon.

Sed ŝajne ĝi estas tamen egoisma, kelkaj diras. Ni rigardu tion. Oni diras, la budhano volas atingi trankvilan kontentigan vivon, volas atingi la nirvanon, do volas ion. Kaj tion li ne volas por ĉiuj homoj (tio ja ankaŭ ne estas plenumebla!), sed por si mem. Rigardu la meditulojn, kiuj emas forlasi la socion, ne plu kunlabori kun la aliaj homoj, nur mediti kaj zorgi, klopodi, ke ili atingu la nirvanon.

Tiun riproĉon mi bone komprenas. Mi legis eĉ pli, ke la budhismaj skoloj estas kvazaŭ bazitaj sur eliteco. La anoj, ne nur la pli altrangaj, ja devas mem decidi pri sia vojo, ne obei al aliaj, mem sin regi kaj formi sin por tiu alta vojo, do temas pri ia elito de homoj, kiuj volas atingi sian celon, sian volon, kaj estas per tio pli altaj, pli "sanktaj" ol la simplaj aliaj homoj.

Tion oni diras. Sed bonvolu pli enrigardi, pli studi la "malĝustan opinion pri la mi", kiu ja estas la egoismo kaj forigenda.

Kio tio estas? Ia opinio pri si mem. Kion oni opiniu? Ĉe la budhanoj oni ne opinias, oni esploru kaj konstatu! Mallonge drite, kvankam la praktika ekkono daŭras iom aŭ multe pli, necesas vidi la fakton, kio estas tio homo en la la mondo.

La demandvorto "kiu" estas ĉi tie jam iom erarige. "Kiu?" kondukas nin al la persono, kiu havas nomon laŭeble bonan, kiu havas profesion bonan, kiu havas espereble havaĵon, kiu estas ia fama aŭ altranga homo. Komprenebl la kontraŭo ankaŭ eblas. Sed ĉe "kiu?" oni ŝatas prijuĝi, almenaŭ diri aŭ imagi iun iom pli malpli altan personon, kiu havas ian "mi", nepre estas gvidata de tiu "mi". La respondo je "kiu?" estus nomo, titolo ktp. Sed nia (aŭ mia) demando ja estas, kio tio estas, tiu "homo"?

Unue oni en trankvilo koncentrite (oni povas diri meditante) konstatu la fakton de la spirado, enspiri kaj elspiri. Kaj nun: ko spiras? Oni povus simple diri, ia besto kun la scienca nomo homo. Sed pli bone oni klare konstatu, kiel bela tio estas, kio spiras, multege pli, ĉar ĝi laboras pli bone ol plej bona fabriko, produktas energion, havas teknikajn plej bonajn aparatetojn (fotoaparaton, aŭskltikojn, konstatilojn ktp, ktp.) kaj tiu granda plej bona aparato laboras, sentas, konstatas, decidas ion fari, kaj ankaŭ havas konscion, ian komputeron, ion en ĝi. Vere, tiuj aparataroj (aŭ mi povus hodiaŭ eĉ diri kvazaŭ aŭto) estas diversaj ĉe la diversaj homoj. Gramatike kaj por la praktiko oni diras "mi" = unua persono, "vi" = nur dua persono, kaj "ili" = la aliaj triaj personoj. Tio estas gramatikrango, sed efikas, ke ni donu al tiuj (propraj) aparatoj ian pli altan "mi", almenaŭ defendinda aŭ defendenda "mi".

Sed la plua observado montras, ke tiuj aparataroj, tiuj homoj ĉiam ŝanĝigas, eĉ iam mortas, do ne estas eternaj, kaj ili ankaŭ estas ne ĉiam bonkompletaj aŭ bonfunkciantaj, ne tutperfektaj. Tio ne estas bela afero, sed ĉiu iam iel malsaniĝas, eĉ se li ne iras al la kuracisto.

Kaj la tria konstato klara - bonnvolu laŭeble ankaŭ mem tion esplori - estas, ke ian specialan "mi" oni ne povas rimarki, konstati aŭiel per niaj konstatiloj vidi, ke ia speciala "mi" ekzistas. Tiu bona aparataro aŭ aŭto aŭ tiu homo kun tiu aŭ tiu nomo ja ekzistas, kun la korpo, kun la sentoj, kn la konstatkapablo, kun la decidiĝa forto, kaj kun la pensoj, ideoj, la konscio ktp., kunl amensa aŭ spirita aparato, sed ia speciala "mi" ne ekzistas. Tio nur estas ia opinio, eĉ iluzio, jen la malĝusta opinio pri la "mi".

Do ĉe vera sekvo de la Budha vojo la budhano konstatas, ke la "mi" ne ekzistas. Ĉio ĉe la homo, ĉe ĉiuj homoj, estas io, ia io, sed nenia "mi". Ĝustas, ke estas malfacile sekvi tiun ekkonon. Sed ĉe severa memregado laŭ la propraj konstatoj tiu "mi" ne plu voloras, validas. Ĝi ne ekzistas. Kaj tiamaiere ĉe budhano sur la ĝusta vojo tiu "mi", tiu malĝusta opinio pri la mi foriĝas aŭ jam foriĝis.

La ŝajno, ke budhismo estas egoisma, do ekzistas. Sed ĉe enrigardo en la vojon tiu malĝusta opinio pri la mi, la egosimo estas forigenda.

Eble estas ankoraŭ malfacilaĵoj, se oni volas vidi la diferencon inter la vivanta homo senegosima, kiu ja tamen ankaŭ spiras kaj mangas kaj trinakas, kaj la vivivolanta homo kun tiu malĝusta opinio pri la mi.

Ke ankaŭ homo, kiu forigis la egoismon,devas spiri, devas manĝi kaj trinki, tio ĝustas. Aŭto ja ankaŭ bezonas benzinon kaj devas esti purigita. Do ankaŭ la senegoisma homo (kiu sekvis la Budhan vojon) devas iri sian vojon de la vivo ĝis la morto. Sed li, la senegoisma homo aŭ la homo sen la malĝusta opinio pri la mi, ne kontraŭas la morton, la finon de la vivo. Li ne plu malamike (aŭ defende) batalas, kaj li ankaŭ ne plu nepre volas tion aŭ tion, profiton aŭ havaĵon havi. La "meza vojo" montras al li spiri, manĝi, trinki, labori, vivi sen tiu malĝusta opinio pri tia alta "mi". Ne

necesas voli la morton, do ian memmortigon por foriri el la malagrabla mondo, ankaŭ ne necasas voli la vivon por resti kaj - tamen iam morti. La “meza vojo”, ne tro tien aŭ tien, nek tro alten aŭ malalten, nek morton voli nek vivon voli! Nur tiu ekkono senegoisma helpas budhanon atingi progreson sur sia vojo.

Budho, lia instruo do rekomendas la vojon senegoisman, la vojon sen la malĝusta opinio pri la mi. Ĉu budhanoj progresas tiele, tio restas demando. Sed ili certe klopodas iri tiun malfacilan vojon.

Al la demandanto kaj al la gelegantoj mi rekomendas, mem provi, mem iri tiun aŭ tian vojon, eĉ se la vorto egoismo aŭ malegoismo estas ĝena, ne helpas. Certe helpas la propra klopodado.